

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 60

Melburno (Melbourne), Australio.

10 junio 1925

HERE AND THERE.

The Chief of the Polish police has asked his men if they are willing to learn Esperanto. Up to the present 400 have replied in the affirmative and as a consequence classes are being arranged. Three lecturers have been appointed to visit the various police quarters to arrange classes.

One great result of the Vienna Congress is the increased interest taken in Esperanto. An association has been founded whose members consist of persons holding some public office. It now holds 14 classes, including some exclusively for teachers. As the result of a recent "drive" it gained during five days, from young people attending the technical schools, more than 2500 students for its classes.

The number of children in Magdeburg who wish to learn Esperanto is given as 1400. Two classes for teachers with an attendance of 60 have been started. These teachers will have learned enough Esperanto to be able to begin teaching children immediately after April. It is not everywhere that teachers are as diligent and progressive as those of Magdeburg.

Directly traceable to the lessons given by radio 1200 Esperanto text

books have been sold in Konigsberg and more than 1000 in Munster.

The British Esperanto Association sold last year approximately 3944 copies of The Esperanto Teacher, 3169 copies of First Steps in Esperanto, 4063 copies of other textbooks, 8137 Esperanto for All, 9228 Esperanto Keys, 1744 dictionaries, and 833 badges. Some thousands of volumes of reading matter were sold in addition to these.

Esperanto is recognized as a living tongue by the United States hydrographic office says the "Pittsburgh Sun." It is one of the languages in which the directions are printed in "bottle papers," which are given mariners to be cast overboard at sea in order to observe the direction and strength of ocean currents. The bottles are picked up by people of all nationalities, and the directions for the return of the papers are therefore printed in eight languages, one of which is likely to be spoken or understood by any civilized dweller along the Seven Seas. The languages are English, French, German, Dutch, Italian, Spanish, Portuguese and Esperanto.

EDITORIAL.

Among the many things, kind and otherwise, said of the "Suda Kruc" during the Congress it was remarked that it never had a "leading article." There have been some articles which were intended to fill that role, but, admittedly, they have been few and far between. Lack of space has been one of the reasons why a regular "leader" has not been printed; but the chief was that the conductors of the gazette were content to do their best to produce a magazine that would be interesting and helpful to Australian Esperantists, at the same time being careful to avoid an attitude of criticism.

Where we believe criticism necessary we will in future state our views, but, as in the past, will strive to restrict the "Suda Kruc" to providing local Esperantists who are not able to subscribe to all the Esperanto papers of the world with judicious excerpts therefrom, with such news of Esperanto progress as we can gather and a page or two of Esperanto for reading practice.

THE CONGRESS.

There were 129 subscribers to the Congress, the business meetings were attended by an average of 35 and the public propaganda meeting fell far short of what was expected of it. The picnic, the ball and the childrens' demonstration were well attended. From this it would seem that the bulk of those who came to the Congress were attracted by its lighter side.

In August last it was announced that an examination for B.E.A. diploma would be held at the Congress. Several Melbourne students were prepared to sit, but having received no notification to present themselves, are much disappointed.

DANKON.

Mi deziras danki tiujn multajn geamikojn Aŭstraliajn kiuj tiel afable faris mian viziton al Aŭstralio and la Kvina Kongreso multe ĝuita. Al Ge-sroj Byatt, F-inoj Holdensen, Irwin, Harwood, kaj S-roj Rawson and Pfahl, mi restas precipe dankema. —Wm. H. King, Wellington, 18an Majo, 1925a.

FIFTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.

Statement of receipts and expenditure:—

Receipts.		
Donations	76	14 3
Members' Subscriptions	113	12 0
Picnic receipts	1	12 6
Rail Tickets (refund) ..	2	4 0
Programs	2	11 9
Ball Tickets	26	11 0
Bank Interest	2	5 8
	£225	11 2

Expenditure.		
Assembly Hall (rent) ..	6	6 0
Melba Hall (rent) . . .	3	5 6
Scenery	4	0 0
Costumes, etc.	6	10 0
Ball (rent and catering)	53	1 7
Picnic (Eltham Park) ..	42	2 6
Printing	21	11 3
Advertising	22	13 6
Stationery	1	2 0
Postage	3	3 10
Sundries	4	13 9
Balance to U.E.A. . . .	57	1 0
	£225	11 2

Expenses amounting to £16 in connection with the conversazione at the Austral Salon were defrayed by the members of the Melbourne Esperanto Club.

HENRY BYATT,
Hon. Treasurer.

23rd May, 1925.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevitaj de la kongresa sekretario:—n-ro 97, S-ro Auwert, 10/6; n-o 98, S-ro Burdum, 21/-; n-o 99, F-ino Bennet, 21/-; n-o 100, F-ino Sinnotte, 21/-; n-o 101, F-ino Wood, 21/-; n-o 102, S-ro Hindmarsh, 21/-; n-o 103, S-ro S. Roberts, 10/6; n-o 104, F-ino C. Hannaford, 10/6; n-o 23, F-ino Williams, 5/-; n-o 105, S-ino Stope, 21/-; n-o 106, F-ino Fowler, 21/-; n-o 107, F-ino Holdensen, 21/-; n-o 108, S-ro Darwin, 10/6; n-o 48, F-ino Walford, 9/6; n-o 109, S-ino Dunne, 21/-; n-o 110, S-ro Henry, 21/-; n-o 11, S-ro Donald, 21/-; n-o 112, S-ro Beers, 21/-; n-o 113, F-ino Helm, 21/-; n-o 115, S-ro Hanks, 21/-; n-o 116, F-ino Stothers, 21/-; n-o 117, S-ro S. Bennett, 21/-; n-o 118, F-ino R. Mitchell, 21/-; n-o 119, S-ro L. Laiho, 21/-; n-o 120, S-ro

Rutland, 10/6; n-o 121, S-ino Porter, 10/6; n-o 122, F-ino Allen, 21/-; n-o 123, S-ro Edmanson, 10/6; n-o 124, S-ino Corrigan, 10/6; n-o 125, S-ro N. Grant, 21/-; n-o 126, F-ino Jones, 21/-; n-o 127, F-ino Corrigan, 10/6; n-o 128, F-ino Hammand, 21/-; n-o 129, S-ino Purnell, 21/-. Donacoj: S-ro Pfahl (glumarkoj venditaj) 10/-; "R," 5/-; S-ro Parker, 10/6.

FORTHCOMING BOOKS.

The following translations are announced:—"Trezora insulo," (Treasure Island, by R. L. Stevenson), translator Percy T. B. Hudson; "Imperiestro kaj Galileano" by Ibsen, translated by H. J. Bulthuis and early publication expected. S-ro Bulthuis recently completed his second original novel, "Idoj de Cereso" and has already commenced work on another, "Idoj de Merkuro." "Chlopi"—"The Villagers," by the Polish writer, Reymont, who has been awarded the Nobel prize, is being translated by s-ro professor Kronenberg.

HELPU LA "SUDA KRUCO."

Kvankam la "Suda Kruc" estas malgranda gazeto, tamen ĝi estas la sola esperanta gazeto en Aŭstralazio. Pro tio necese estas, ke ĉiuj esperantistoj subtenu ĝin. Oni povas diversmaniere fari tion. Unue fariĝante abonanto, due, serĉante novajn abonantojn, trie per antaŭe pagitaj anoncoj kvare per esperanta novaĵo kaj interesaj sciigoj pri-la-internacia help-lingvo sendotaj al la redaktoro. Estas bone konata fakto, ke ĉiu progresema movado devas havi rimedon por disvastigi tiun movadon, tial la devo de la esperantistaro de Aŭstralazio, kiu

tut-kore kredas ke nia lingvo estas necesa por la homaro kaj tut-monda paco, estas subteni la rimedon kiu troviĝas je la "Suda Kruc." Ni helpu la penadojn jam faritaj kaj farataj de la administrantoj. Bedaŭrinde kelkaj esperantistoj volas anstataŭigi nian gazeton per malgranda folieto en-metota en brita gazeto. Sendube tiu paŝo estus malantaŭen. Ni iru ĉiam nepre antaŭen. Dum la pasintaj kvin jaroj de kiam nia gazeto starigis la redakcio senpage kaj sinĉone faris la laboron malgraŭ la financa flanko, kiu ĉiam ilin genas. Nuntempe nia gazeto ŝuldas kelke da funtoj al la Melburna Esperanta Societo, kiu tiel malavare konsentis pruntedoni tiom da mono. Esperantistoj! la "Suda Kruc" estas la via. Ĉu estas dece, ke vi restas ŝuldantoj?

HO EO.

OUR SUPPORTERS.

Miss M. Trundle, Eumundie—"Every month my copy comes without fail. I have grown very fond of the magazine. For the isolated student it is necessary."

Mr. F. Leahy, Perth.—"It would be a regrettable affair if the "Suda Kruc" ceased to appear, because in my opinion it is the only chain linking up the Esperantists of the various States. I also wish to congratulate s-ro P.H. for his articles about Australia. In my opinion our gazette needs workers, not critics."

Mr. D. Guilbert, Hobart.—"I read with great interest, and I must say disappointment, the discussion about the publication of the "Suda Kruc," which took place at the Congress. I cannot at all understand why there should be opposition to it. It is the only link we, who live away from the chief centres, have to keep us in touch with what is going on and it is a very real help in the way of

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriptan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POKE VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

propaganda for those commencing . . . As regards the disparaging remarks made about it, I consider they are totally unwarranted. . . I hope to be able to send something in the nature of a joint appreciation from our Club and protesting against the resolution of the Congress."

RE "SUDA KRUCO."

To the Editor.

The members of the Hobart Esperanto Group have read with much surprise the report of the resolution passed at the recent Congress that the Suda Krucio should cease publication. Subscribers in Hobart value the paper very much as being the only regular means of keeping in touch with activities in the other States and the progress of the A.E.A. generally, and very much enjoy the articles appearing in the journal which are made use of for propaganda and also to send to correspondents abroad.

They wish to protest against the decision which was arrived at without reference to the subscribers in the other States, and also against the adverse criticism of the paper which they consider unfounded, and at the same time to express their appreciation of those who have all along devoted their time and energy to the publication of the journal, and hope that it may be possible to continue same.

CORA M. HANNAFORD, President.
ANNIE BECKITT, Secretary.

Receipts (Subscriptions).

Up till 22nd May we have received the following sums (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—N. W. Frost, advt., 4/2; — Wilson, 4/6 (5/26); D. Hitchcock, 5/- (6/26); D. B. Thomson, 4/6 (2/26); A. E. Mason-Beatty, 4/6 (6/26); P. Leahy, 4/6 (7/25); M. Dunn, 4/6 (5/26); H. M. Colwell, 4/6 (5/26); F. E. Horne- man, 4/6 (5/26); R. Reidson, 4/6 (5/26).

Donations.

Percy T. B. Hudson, £20; R. B. Bigelow, £1/1/-; A. E. Mason-Beatty, 5/6; R. Reidson, 15/6. (Thank you, friends, for your practical help. Ed.)

RECENZOJ.

PRO IŜTAR, Romano el la antikva Babela historio. Originale verkita de H. A. Luyken. F. Hirt & Sohn, Leipzig, 5.50 orm.

Ĉi tiu nova romano de Luyken havas temon tre similan al tiu de "Faraono," nome, lukto inter reĝo kaj pastraro, sed la scenejo estas en Babelo, ne en Egiptujo. En la serio de Luykenaj verkoj videbla estas la grada disvolviĝo de la rakontaj povoj de la verkisto, kiuj en "Pro Iŝtar" produktis verkon de elstaranta boneco. Ĉar la personaro ne estas grandnombra ĉiu estas kvazaŭ vivanta estaĵo antaŭ la mensa okulo de la leganto. La ofte montrita kvalito de trafa kunmetado de vortoj, kiun oni rimarkas en ĉiuj, liaj verkoj, estas denove plene ekspluatita. Malgraŭ la neordinara temo la lingvaĵo de la libro estas fundamenta, fluegebla kaj plaĉa. La forta homo de la romano ne estas Omar, la heroo, sed Lemuel; kaj ĉiu leganto konsentos, ke ne Zalmuna, sed Adaha estas la vera heroino. Cetere tiu lasta estas la feliĉa fraŭlino en la tre bela amarakonta parto de la libro kaj oni ĝojas, ke ŝia elektito, Oriel, tiel meritis la vivlongan kuneston kun ŝi. Vorton de laŭdo meritas la kompostado: mi ne rimarkis eĉ unu preseraron. La libro estas forte bindita, kaj pro la malsamaj koloroj de la malantaŭa eksteraĵo kaj la supraj randoj de la frunta bindmaterialo donas tre artan efekton. Fine mi tiel ĝuis la legadon de "Pro Iŝtar" ke mi ne povas ne peti ĉiun Esperantiston, ke tiu, kiel eble plej baldaŭ, aĉetu kaj legu ĝin. (C.W.B.)

EL LA SKIZLIBRO, Washington Irving, el la angla originalo tradukis H. L. Elvin. Internacia Mondliteraturo, volumo 9, de eldono F. Hirt & Sohn, Leipzig. 1.20 orm.

La aŭtoro naskiĝis en Nov-Jorko, Usono, la unuan de Aprilo, 1783. Dum 1815-22 li vivis en Eŭropo. Eble estis per la amikeco de Sir Walter Scott, ke Irving ricevis helpon kaj kuraĝigon. La "Skizlibro" estis skribita en Anglujo, sed jam aperis en Usono antaŭ ol la kolekto estas presigita en Anglujo en 1819. Ne estas hecese ĉi tie diri ion pri la stilo kaj meritoj de la libro. Ĉiu sciinto de la angla lingvo, se li mem ne legis "Rip van Winkle," scias ke li

estas la homo kiu dormis dum 20 jaroj kaj vekiginte tre miregis tiujn amikojn de lia junaĝo, kiuj ankoraŭ vivis. Ke, kie ajn la angla lingvo estas konata, tiu, kiu ne estas progresinta laŭ la tempo, nomigas "Rip van Winkle," estas atestaĵo, ke la romaneto elvekis pli ol ordinaran intereson. Krom la ĉefa rakonto la nuna verketo enhavas tri malpli ĝenerale konatajn, sed tamen legindajn, historietojn. (C.W.B.)

BULGARA ANTOLOGIO, prozo kaj poezio. Kunmetis Ivan H. Krestanov, kun antaŭparolo de A. D. Atanasov. Bulgara Esperanto-Biblioteko, Sofia, 1925, 100 leva.

De antologioj Esperanto jam havis bonajn ekzemplerojn, por citi nur unu mi menciis la Polan de Kabe. Bonveninda estas la Bulgara, libro de 243 paĝoj de prozo kaj poezio, kiu konatigas al ni ne malpli ol 40 naciajn verkistojn. Dekon de portretoj troviĝas en la libro, sed ĉar la papero kaj presado estas malbonaj oni ne povas laŭdi ilin. Fakte estis grava eraro eldoni tiun nemalkaran libron enhavanta 57 preserarojn, kiujn oni ekvidis dum presado, kun papero nur faldita kaj tute nebindita, tiel, ke kiam la paĝoj estas tranĉitaj la libro falas en disiĝintajn foliojn. Pro la bona enhavo, pro la talentoj kaj laboremezo de la tradukinto kaj pro la bonfamo de la eldonistoj ĉiu nevendita ekzemplero devus esti dece bindita. (C.W.B.)

LA URBESTRO DE ZALAMEA, de Calderon de la Barca, dramo en tri aktoj, el la hispana lingvo tradukis Enrique Legrand. Eldonita de la tradukinto, Strato 25 de Mayo 734, Montevideo, Uruguay. Prezo ne montrita.

Interesa elmontro de hispana dramverko. La tradukinto submetis sian tradukon al la trarigardo de s-roj Mabon Warden kaj William Harvey, do, oni povas plene fidi al la bonstilo de la enhavo. (C.W.B.)

FOR THE SCHOOL LIBRARY

Spoken Esperanto: Frost

By the DIRECT METHOD for BEGINNERS
Stiff Paper Covers 56 Cents, postpaid

N.W.Frost, 12 Ash Place, Cambridge 38 Mass.

KONGRESIMPRESOJ. de "Observanto."

"Kial kongresoj ne povas daŭri tutan jaron?" mi aŭdis entuziasman kongresanoni diri kaj tiuj vortoj prave esprimis la internan senton de multaj partoprenintoj. La ĝojo esti parolanta Esperantisto, renkonti neviditajn korespondantojn, aŭdi aŭstraliajn famulojn, kiuj ĝis tiam estis nuraj presliteroj en ĵurnaloj kaj leteroj kaj vivi inter ili, estis aferoj kiuj nin altiris al Melbourne. Kiamaniere oni sukcesis, montriĝis per diversaj rimarkoj dumtempe, unu el kiuj estis la supra.

Por diverseco la kongresprogramo estis imitinda kaj tute alia ol la antaŭa en Sidnejo, sed oni devas memori la diferencon inter la du urbejoj—geografe, klimato kaj popolo. La organizintoj de la Kvina bone utiligis ĉion kaj kvankam ili ne povis aranĝi urbestran akcepton kaj tutagan ekskurson sur belega haveno en registara ŝipo, ili anstataŭigis neforgeseblan infanan demonstracion en la universitato kaj grandiozan internacian balon.

En la memoro de ĉiu kongresano restos longe la bonege prezentitaj teatraĵoj, kantoj kaj dancoj faritaj de 10—14 jaraĵ infanoj dum 2½ horoj, tute en nia lingvo. Ilia elparolado, ludado kaj memfido estis laŭdindaj kaj pro tio la instruistinoj meritas specialajn honorojn. Certe estis la unua fojo, kiam tia instrua amuzaĵo okazis en Aŭstralio kaj oni demandas sin, ĉu aliaj landoj penis aranĝi similan prezentadon? Tre interesus nin aŭdi pri tio.

La kongresbalo, laŭ modelo de l'mondkongresoj, estis sukceso de komenco ĝis fino. Por vizitantoj okupantaj sidlokojn sur la galerio kaj ĉirkaŭrigardantaj la tutan halon, la vidaĵo de viroj kaj virinoj en diversnaciaj kostumoj orde marŝante kaj poste dancante en rondoj laŭ nacio, certe estis brila spektaklo. Ĉu oni rigardis la hispanajn aŭ grekajn, malnov-anglajn aŭ meksikajn, francajn aŭ italajn, la penegaj detaloj de l'vestaĵoj estis rimarkindaj kaj la surpentritaj drakoj sur multekostaj silkaj ĉinaj kostumoj similis artan konkurson. Eĉ la "jazz" muziko de la blinda orkestraro ne povis esti plibonigita. Tre malvole oni veturis

hejmen per automobiloj post kiam la horloĝo sonoris la duan.

Pri fratharmonio oni preskaŭ ne bezonas skribi. Angla ŝerckantado diras: viaj amikoj estas miaj amikoj kaj miaj amikoj estas viaj amikoj, kaj ĉiu kongresano spertis tion. Nur unu malakordo rimarkigis, okazinte dum la negoca kunveno. Oni vikle diskutis "La Suda Kruc", ĉu ĝi daŭru aŭ mortu, kaj tiam kelkaj Melburnanoj malkaŝe montris malamikecon. Bedaŭrindega afero inter Esperantistoj! Sekvu la Majstron, estu pacaj kiel en aliaj aferoj kaj ne dispelu la fortojn!

La tagjurnaloj raportis la kongreson bilde kaj vorte; entute ili enpresigis 48 kolorojn pri la kongreso mem kaj 22 kolorojn pri esperantaĵoj. Konsiderante, ke la Melburna gazeto estas iom konservativa, oni povas esti tre kontenta kun tiom da publikeco.

Dankante al la organizintoj, mi esperas, ke la fruktoj de ilia laboro ne restu nur en Melburno, sed ankaŭ disvastiĝu tra Aŭstralazio. Montru, ĉiu el vi, ke la kvina kongreso impresu vin kaj daŭrigu la disvastigon de nia lingvo kaj niaj celoj, helpu laŭpove, eĉ se nur en malgranda maniero, sed faru ion, kaj tiam ni konstruos vojon por eĉ pli bona sesa kongreso.

DEATH OF MISS MARION FRASER.

It is with the deepest regret that we announce the death of Miss Marion Fraser, of Brisbane, who passed away on 29th April, on her way homeward from the Melbourne Congress. As Miss Fraser had expressed herself as being much improved in health, the sad news came as the greatest shock imaginable. For many years Miss Fraser was one of the mainstays of our movement in Brisbane and by her death Esperanto loses one of the most enthusiastic and tireless of supporters. Our sincere sympathy goes out to her relatives.

S-RO LAURI LAIHO.

Melbourne Esperantists regret the departure of S-ro Laiho. He came to Australia from Finland about

twelve months ago and entering wholeheartedly into our local Esperanto activities became a general favourite by his affable demeanour. "La Suda Kruc" has been indebted to him for contributions to its columns and hopes to receive further items from him. We understand that S-ro Laiho is not quite decided as to his future movements, but intends at any rate to spend some time in Sydney. We wish him the best of good fortune in his new location and commend him to the good offices of the Esperantists he may meet.

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K. — "Wireless Weekly," senfadena ĵurnalo kun la plej granda cirkulado en Aŭstralazio, jam delonge subtenante Esperanton, nun ĉiusemajne publikigadas notojn pri la ~~esperanta~~ movado en Radiujo. Arangoj ankaŭ estas farataj, kun la helpo de niaj samideanoj S-roj L. E. Pfahl kaj F. T. Simon, aperigi kompletan kurson de Esperanto.

"The Great Northern," senkosta tagjurnalo aperanta en Norda Sidnejo, je la 11a Majo presadis tutpagaran artikolon pri nia lingvo skribita de S-ro R. B. Childs.

Nova grupo en Mosman (antaŭurbo de Sidnejo) starigis dum Majo sub gvidado de S-ro F. V. Taylor. Estas 11 komencantoj, grandparte teosofistoj. Kunvenejoj: Konservatorio de Muziko, Mosman, ĉiulunde.

Okazaĵoj ĉe la "Sydney Esperanto Society":—

Aprilo 23 — Reveninto de la Melburna Kongreso, S-ro Pfahl rakontis intersaĵojn kaj S-ro W. H. King, prezidinto de la kongreso, kiel vizitanto hejmvoyaĝante Nov-Zelandon, ankaŭ alparolis la klubanojn pri siaj impresoj kaj spertoj.

Aprilo 30 — Parolado de S-ro D. Calnan pri fama skota poeto Robert Burns. Citaĵoj el poemoj okazis angle, sed alie nur Esperanto estis uzita — firma regulo de la societo.

Majo 7 — Lumbilda lekcio pri "Moskitoj kaj Muŝoj" de S-ro Pfahl. Majo 14 — "Oliver Twist," teatraĵo el "International Language," ludita de diversaj membroj.

Majo 21 — Parolado de S-ro D. Healy pri Kvinslando, ilustrita per 60 lumbildoj. — Ĉeestantoj decidis

oficiale sendi gratulojn al du novgeedzigintaj samideanoj, S-ro R. R. Rawson kun F-ino Florence Mitchell, ambaŭ el Melburno, kaj S-ro W. Hamann kun F-ino Hossmann, Sidnejananoj. Ke aliaj baldaŭ sekvu! Kresku Esperantujo!

May 28 — Tiel nomata "Diskuta kaj sugestia vespero." Membroj faris proponojn pri la konduko kaj plibonigo de la societo. Kelkaj sugestioj estis akceptitaj.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Eble vi estas naturamanto, se jes, interesos vin legi la sekvantan tradukon, kiun mi faris el artikolo, verkita de S-ro A. Meston por la "Worlds News."

— En la loĝataj distriktoj de Aŭstralio, ĉe lokoj antaŭe vizitataj de la bela moskanaso, (Biziura lobata), ĝi nuntempe tre malofte estas vidata. Ĝi estas la plej homtima el ĉiuj de niaj akvobirdoj, kaj en la nur tri nestoj, kiujn mi trovis, estis nur po 2 ovojn en ĉiu, belaj olivkoloraj ovojn, tre grandajn, laŭ mezuro 3 colojn longajn, kaj 2 colojn largajn.

— Antaŭ ol mi renkontis s-ron J. Tyson, mi kredis, ke mi estis la sola blankhaŭtulo, kiu sciis la sekreton, kial la moskanaso dum normaj kondiĉoj, ne povas flugi, aŭ eĉ altigi sin de la akvo, sed kiu, kiam forvaporiĝis la akvo el la lageto dum la varma sumero, povas iri al alia lageto je distanco de 10 aŭ 20 mejloj.

— Mia unua suspekto pri la sekreto, estis, kiam mia reporthundo trovis la odoron de moskanaso ĉe seka tero, mejlojn for de la akvo. Laodoro estis freŝa kaj atentinda. La hundo ekscite ĉirkaŭkuris, sed ne povis trovi la odoron, krom ĉe la unua loko, kaj estis tie, kie la moskanaso, flugante dum la nokto, restis por ripozi, kaj poste daŭrigis la flugadon.

— Post 2 aŭ 3 okazoj mi prideman-

dis la maljunajn indiĝenojn, kiuj ĉiam atenteme studas la naturon, la rezulto estis la sekvanta miriga informo, kiun mi poste elpruvis, kaj trovis tiu prava. Ĝi estas la nura ebla klarigo.

— Plenkreska moskanaso, kiam ĝi alvenas al lageto, pezas 2 aŭ 2½ funtojn. Ĝi baldaŭ grasiĝas, ĝis ĝi pezas 6 funtojn, kaj en tiu stato per ĝiaj malgrandaj flugiloj tute ne povas flugi aŭ eĉ altigi sin el la akvo. Kutime ĝi subakvigas pro sendanĝereco, kaj la rapideco pri kiu ĝi povas fari tion, estas preskaŭ ne kredebla. Ambaŭ la ino kaj la virbirdo naĝas kun nur la kapo el la akvo, kaj estas mirinda kiel longe ili povas resti sub la akvo, ĉar, kiam ili estas mortpafitaj, ili venas al la surfaco kaj surnaĝas same kiel aliaj anasoj. La moskodoro troviĝas nur ĉe la virbirdoj, kiuj estas multe pli grandaj ol la inoj, kaj la forta moskodoro estas difuzita tra la tutplumaro, sed estas pliforta ĉe ovala pendado, parte sub la malsupra beko, kaj parte sub la kolo.

— La plumaro de la virbirdo estas neprikribeble bela, estante malhela bruno sur la dorso, kaj ekbrilanta arĝentgriza sur la brusto. La felo de unu bela virbirdo, mortpafita de mi, el kiu por mi estis fabrikita bonega mufo, ankoraŭ estas tiel perfekta, kiel en la tago, kiam la birdo estis mortpafita en la jaro 1873, kaj ĝi ankoraŭ tenis la moskodoron dum almenaŭ 30 jaroj. La virbirdo estas forta kun masiva kapo, kaj fortaj kruroj, kaj okaze oni povas vidi lin starigi sin, kaj gliti distancon de eble 200 jardoj laŭ la surfaco de la akvo sur la vosto, sed ĝi ne povas altigi sin de la akvo, sed povas subakvigi sin kun fulma rapideco, kaj resti sub la akvo nekredeblan tempon, kaj plejofte oni neniam plu vidos ĝin; je tiuj okazoj ĝi elmetas nur la bekon el la akvo, kaj kaŝita sub ia naĝanta folio, restos tie ĝis forpasis la danĝero.

Kun kora manpremo via fidele, P.H.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STREET, KEW.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Suda Krucio," Box 731 F, P.O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia." Arbeider-Esperantisten, 3; Amerika Esperantisto, volumo 34, 1; Belga Esperantisto, 1 (119); Esperantista Junularo, 25; Heroldo de Esperanto, 16 ĝis 29; Holanda Esperantisto, 157 ĝis 162; Itala Esperanto Ruvuo, 2, 3; International Language, 3; Kristana Espero, 5,6; La Revuo Orienta, 3, 4; La Kolportisto, 2; La Progreso, 4, 5; Litova Stelo, 3; La Unuigita Tuthomaro 2, 3; La Interligilo de l'P.T.T. 28, 29; Literatura Mondo, 3; Le Monde Esperantiste, 1 (137); La Suno Hispana, 94; Pola Esperantisto, 1, 2; Reklamo, 3; Svenska Esperanto-Tidningen, 3, 4; The British Esperantist, 240.

CERTIFICATES.

(Preliminary and Advanced).

An examination for the above will be held at the rooms of the Sydney Esperanto Society on Thursday, 2nd July, 1925, at 7.30 p.m.

Intending candidates may obtain further particulars from the Secretary, Mr. L. E. Pfahl, Croydon Park, N.S.W.

FILIIGITAJ GRUPOJ.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Pfahl, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso,

Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunveno kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunveno, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne; by McLean Publishing Co., Oakleigh.